# *Meksiko ratifas decidon dungi kubajn kuracistojn*



**Meksiko ratifas la decidon dungi kubajn medicinajn specialistojn.**

Havano,  jun 30  (RHK) La prezidento de Meksiko, Andrés Manuel López Obrador (AMLO) ratifis ?i-merkredon en sia lando, ke 500 kubaj kuracistoj en multnombraj fakoj estos dungitaj en unua etapo, konsiderante ke sanservo estas homa rajto.

En sia matena gazetara konferenco en la Nacia Palaco, la prezidento tiel respondis al demando de ?urnalisto pri kovrado de vakaj postenoj.

Li diris, ke la enga?i?o de lia ekzekutivo estas, ke ?iuj meksikanoj havas la zorgon de ?eneralaj kuracistoj kaj specialistoj, kaj "tial ni alportos ilin el Kubo, kies popolon kaj registaron ni dankas pro ilia solidareco, ?i estas frata nacio," li ripetis.

"En ?i tiu unua etapo estos 500 kaj jam estas sperto pri la kvalito de ilia laboro, ?ar ili estis en Meksiko dum la pandemio de Kovim-19, sed ni bezonos pli ?ar la deficito estas granda, kaj ni anka? dungos el

aliaj landoj ?ar ni devas havi ilin en ?iuj hospitaloj,” aldonis AMLO.

Li esprimis, ke “tiu estas mia enga?i?o, unuavice sano por ?iuj kaj rompo kun la tuta malbono de tiuj koruptaj, konservativaj, retrogradaj registaroj, kiuj lasis la landon sen kuracistoj kaj respondecas pri tio, ke en Meksiko ni ne havas la kuracistojn kaj specialistojn  bezonatajn".

Li konstatis, ke kubanoj ?iam helpas kaj agas solidare, “kaj ni esperas, ke kun ilia ?eesto kaj tiu de aliaj landoj ni havos tempon por trejni meksikajn specialistojn, ?ar ni jam duobligis la spacon en medicino kaj flegistaj lernejoj, ?efe por speciali?o-fakoj, ?ar el  8.000 lokoj, ni nun superas 20.000”.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/292157-meksiko-ratifas-decidon-dungi-kubajn-kuracistojn

**Radio Habana Cuba**